

Intervjuo kun Olivier Tzaut pri lia metodo
prezenti Esperanton al gelernantoj kaj geïnstruistoj
Radioprelego de Claude GACOND, SRI 698, 1977.02.23 & 25 & 26

Cl.- Parolas Claude Gacond. Mi havas la honoron intervui la sekretarion de la kampanjo 'Esperanto en la lernejojn', Sinjoro Olivier Tzaut. Sinjoro Olivier Tzaut, pasintan semajnon vi parolis al ni pri la kampanjo, kiun vi lanĉis kun gekolegoj antaŭ du jaroj. Tio estas : en februaro 1975. Vi tiam diris, ke grava aspekto de la laboro estas la prelegado pri-esperanta. Ĉu vi povas prezenti viajn eksperimentojn tiurilate ?

OT.- Tre volonte. Mi prezentis Esperanton unuafoje kun Claude Piron, kiu estas poligloto, ekstradukisto ĉe UN en Novjorko, al grupo nomita 'Pripensa grupo de Romanda Societo Pedagogia' – en la franca: 'Société pédagogique romande'. La kunveno okazis en Ĝenevo. Partoprenis ĝin sep geïnstruistoj inter ili la prezidanto de tiu societo. Estis tre amuze. La plimulto el ili estis tipaj intelektuloj. La 'batalo', se oni povas tiel sin esprimi, daŭris ses horojn, de la ses vespere ĝis noktomezo, en la stacidoma restoracio de Ĝenevo. Post du horoj la aŭskultantoj estis videble ŝanceligitaj. Poste ni altabliĝis por la manĝo kaj la diskuto daŭris. Mi prenis mian gitaron kaj kantis kelkajn kanzonojn, esperantigitajn de Claude Piron. Ĉirkaŭ la 10a, la plej malfacile konvinkebla diris : «Tamen, se nun oni donus al mi 5 minutojn por elekti ĉu mi lernos la anglan aŭ Esperanton, mi ne scias, kion mi elektus.» Ho ne, diris la edzino, ne diru tion, ĉar ŝi estis jam konvinkita. Kaj noktomeze la sama sinjoro diris : « Nu, ni devas konstati ke vi povis taŭge respondi al ĉiuj niaj argumentoj. »

Cl.- Ĉu tiu vespero havis pozitivajn sekvojn ?

OT.- Ho, jes, tiu instruisto, do la malfacile konvinkebla iris paroli kun la direktoro de la centro por perfektigo de la ĝenevaj instruistoj. Kaj dank'al liaj klopodoj 12 ĝenevaj geïnstruistoj nun lernas Esperanton. Kaj li estas unu el ili.

Cl.- Kaj nun, ĉu vi povas doni al ni kelkajn statistikajn informojn pri via preleglaboro.

OT.- Jes. Por ne lacigi vin, mi diros la kategoriojn de personoj al kiuj mi parolis kaj kelkajn ciferojn. Mi prelegis en elementaj lernejoj, mezlernejoj, por profesoroj en porinstruistaj lernejoj, centraj komitatoj de kantonaj pedagogiaj societoj, lerneaj inspektoroj, en kunvenoj de instruistoj, en popoluniversitatoj, mi faris diversajn prelegojn ankoraŭ, mi parolis kun ĵurnalistoj kaj ni havis kelkajn elsendojn. Sume mi faris 65 prelegojn. Mi povis tiel tuŝi 750 geïnstruistojn. Kaj entute 1'700 personojn.

Cl.- Vi priskribu al ni vian prelegteknikon.

OT.- La prelego devas kompreneble esti adaptita al la aŭskultantaro. Mi havas plurajn skemojn, sed tre ofte mi improvizas, ne sekvante tekston laŭvorte. Tio havas avantaĝojn, sed ankaŭ malavantaĝojn. La ĉefa avantaĝo estas ke kiam oni devas fari trifojn dum la sama tago la saman prelegon, oni ne tro havas la impreson fariĝi kvazaŭ magnetofono. La malavantaĝo estas, ke oni forgesas foje gravajn aspektojn aŭ perdas tro da tempo por aferoj aksesoraj.

Cl.- Ĉu vi pripensis pri pli kontentiga solvo, kiu evitu fariĝi magnetofono ?

OT.- Jes. Ŝajnas al mi ke ni devas pretigi registraĵon, 20 aŭ 25 minutan entenanta la nepre dirotan aferon kun diapozitivoj, kiujn oni vidus samtempe. La prezentado disvolviĝus tiel :

unue 10 aŭ 15 minuta prezentado parola, due : la registraĵo kun la lumbildoj, trie : respondo al la demandoj, diversaj informoj.

Cl.- Ĉu estas io kio aparte taŭgas, laŭ vi ?

OT.- Jes ! Mi ĉiam montras la prospektojn en Esperanto de la firmaoj Fiat kaj Phillips. Ili estas tre okulfrapaj. Poste mi uzas retroprojekciilon por montri la strukturon de la lingvo. La vortformadon, la konjugacion. La homoj tuj eltrovas mem la vorton kaj mi ofte diras : jes, ĝuste, kaj en la franca kiel vi diras ? Kaj plej ofte oni ne konas la vorton en la gepatra lingvo. Poste mi legas tekston en Esperanto kaj tre ofte mi aŭdas iun diri: «vere, tiu lingvo sonas belege». Mi pensas, ke a homoj nepore devas aŭdi la lingvon. Pro tio, la prezentanto ne nur devas bone scipovi la lingvon, sed ankaŭ bele elparoli ĝin. Tio estas la ne-malhavebla kondiĉo por ke la homoj estu vere gajnitaj.

Cl.- Ĉu vi havas alian konvinkigilon ?

OT.- Jes, mia sekreta armilo se mi povas diri, estas mia gitaro kaj la kanzonoj esperantigitaj de mia amiko, Claude Piron. La aŭskultantaro ricevas la vortojn kun la traduko, aŭ mi projekcias ilin sur ekranon kaj ni kantas.

Cl.- Kion vi evitas ?

OT.- Nu, mi evitas esti negativa. Tio signifas, ke mi ne plu parolas pri la persekutoj aŭ pri la bremsoj, kiuj malhelpis rapidan disvastiĝon de la uzo de Esperanto. Sed mi respondas al la demandoj, kompreneble.

Cl.- Ĉu estas io alia, kion vi nepre evitas ?

OT.- Jes. Kelkvorte, jen kio : por konvinki oni devas paroli kun konvinko. Sed, se oni volas tro konvinki, tio returniĝas kontraŭ ni kaj forpuŝigas la homojn, kiuj estis pretaj aliĝi al nia ideo. La regulo do devas esti, nek tro nek maltro da konvinko. Kiel per la salo en la supo. Sed tio estas pli facile direbla ol farebla.

Cl.- Kiom da tempo daŭras prelego?

OT.- Varias inter 30 minutoj kaj 6 horoj – sed fakte nur unu foje tio daŭris ses horojn, en Ĝenevo. Sed foje la prelego daŭris tri horojn sen paŭzo, kaj fine la direktoro (estis en porinstruista lernejo) devis ĉesigi la demandojn kiuj plu alvenis, ĉar la lernantoj devis reveturi trajne. Sed, pli kaj pli, mi faras 45 minutajn prelegojn. Estas multe pli bone fini brile, kaj ke la homoj diras « ho, jam finite », ol finfine lacigi kaj lasi malbonan impreson.

Cl.- Kion vi konklude ŝatus aldoni?

OT.- Mi diros ke oni nepre ne propagandu, sed informu.

Cl.- Vi aŭdis intervjuon el Svislando. Claude Gacond parolis kun sinjoro Olivier Tzaut, la sekretario de la kampanjo ‘Esperanto en la lernejojn’. Ĝis reaŭdo! Post tiu intervjuo vi aŭdu kanzonon kantitan de Olivier Tzaut.

OT.- Temas pri jida kanzono: ‘Elimeleĥ’. (muziko)